

Bazaj reguloj

1. **Mondaj vortoj:** Pandunia estas egala monda lingvo. Internaciaj vortoj estas pruntita de ĉiuj partoj de la mondo al Pandunia. Oni adaptigas al la prononcaj kaj skribaj sistemoj de Pandunia. Nur unu baza vorto estas pruntita kaj aldonaj vortoj estas kunmetitaj laŭ regulo 10.
2. **Prononco:** Ĉiu vorto elparoliĝas kiel ĝi skribiĝas. Neniu litero estas silenta. Nur minusklaj literoj estas necesaj.
3. **Akcento:** La akcento estas sur la silabo, kiu estas antaŭ la lasta konsonanto.
4. **Pronomoj:**
 - La personaj pronomoj estas: **mi mi**, **tu vi** (ununombre), **da ĝi, li aŭ ŝi**, **mimen ni**, **tumen vi** (multenombre), **damen ili**.
 - La posedaj pronomoj estas: **mi su mia**, **tu su via**, **da su ĝia, lia aŭ ŝia**, **mimen su nia**, **tumen su via**, **damen su ilia**.
 - La demandaj pronomoj estas: **ke kio** aŭ **kiu**, **ke su kies**.
5. **Substantivoj:** Substantivoj ne ŝanĝiĝas laŭ nombro aŭ genro. Nature, ili estas nek virgenraj, nek ingenraj, nek ununombraj, nek multnombraj.
6. **Nombrovortoj:** La kardinalaj nombroj estas: - 0 **siro**, 1 **un**, 2 **du**, 3 **tri**, 4 **nelu**, 5 **lima**, 6 **luka**, 7 **ceti**, 8 **bati**, 9 **tisa**, 10 **des**. - Pli ol dek: 11 **des un**, 12 **des du**, 13 **des tri**, ktp. - Dekoj: 20 **du des**, 30 **tri des**, 40 **nelu des**, ktp. - Centoj: 100 **un sento**, 200 **du sento**, 300 **tri sento**, ktp. - Miloj: 1000 **un kilo**, 2000 **du kilo**, 3000 **tri kilo**, ktp. - La ordaj nombroj havas sufikson **me**: **un me** (la unua), **du me** (la dua), **tri me** (la tria), ktp.
7. **Modifaj vortoj:** Adjektivoj kaj adverboj havas saman formon. Ili antaŭas la vorton, kiun ili modifas.
 - **un suga loge** – rapida parolo.
 - **tu suga loge**. – Vi rapide parolas.
8. **Verboj:** Verboj ne ŝanĝiĝas laŭ persono, nombro aŭ tempo. Helpaj verboj indikas tempon.
 - **zai** indikas nunan agadon.
 - **le** indikas finigitan agadon kies rezulto estas grave en la nuna situacio.
 - **pas** indikas pasintan agadon.
 - **sha** indikas estontan agadon.
9. **Vortordo:**
 - La normala vortordo estas subjekto–verbo–objekto. La sama ordo estas uzata kaj en deklaroj kaj en demandoj.
 - Pasiva frazo estas kreita per helpo de verbo **be**. Oni povas atingi similan rezulton per la nepersona pronomo **se**.
 - **pandunia be loge**. – Pandunia estas parolita.
 - **se loge la pandunia**. – Oni parolas pandunian.
 - En la *ĉarnira konstruo* la objekto de la unua verbo rolas kiel la subjekto de la dua verbo.
 - **mi ching tu loge pandunia**. – Mi petas ke vi parolas Pandunia.
 - Oni povas forĵeti pronomojn kiam ili estas nenecesaj.
 - **mi ching tu loge pandunia**. → **ching loge pandunia**. – Bonvolu paroli Pandunian.
10. **Vortfarado:** Oni povas krei novajn vortojn kunmetante aliajn vortojn. La ĉefa vorto ĉiam staras je la fino.
 - **posta** (“poŝto”) + **kasa** (“kesto”) = **posta kasa** (“leterkesto”)

Prononco de pandunio

Pandunio uzas la bazan latinan alfabeton. Jen la pandunia alfabeto kaj prononco laŭ Internacia Fonetika Alfabeto (IFA).

Pandunia	IPA
A	a
B	b
Ch	tʃ
D	d
E	e
F	f
G	g
H	h (x)
I	i
J	dʒ
K	k ^h
L	l
M	m
N	n (ŋ)
P	p ^h
O	o
R	r (r)

Pandunia	IPA
S	s
Sh	ʃ
T	t ^h
U	u
V	w (v v)
Y	j
Z	z (dz)

En pandunio ĉiu litero reprezentas ĉiam unu saman sonon. Ne estas sensonaj literoj.

Fonemaro

La tuta fonemaro de Pandunia estas en la suba tabelo.

	Lipa	Alveola	Palata	Vela	Glota
Plozivo	b p	t d	ch j	k g	
Frikativo	f	s z	sh		h
Naza	m	n		ng	
Lateralo		l			
Trilo		r			
Duonvokaloj	v		y		
Malvastaj vokaloj	u		i		
Duonvastaj vokaloj	o		e		
Vastaj vokaloj		a			
	Malantaŭa	Centra	Antaŭa		

Vokaloj

Pandunio havas kvin vokalojn. Ili estas prononcitaj kiel en Esperanto.

Duonvokaloj

- **v** = [w] ~ [v] ~ [v]
- *V* estas prononcata kiel esperantaj *ŭ*, sed kelkaj paronlantoj povas prononci ĝin kiel *v*.
- **y** = [j]
- *Y* estas prononcata kiel esperanta *j*.

Konsonantoj

Pandunia enhavas 19 konsonantojn.

- **b** = [b]
- **ch** = [tʃ]
- *Ch* estas prononcata kiel esperanta *ĉ*.
- **d** = [d]
- **f** = [f]
- **g** = [g]
- **h** = [h] ~ [x]
- *H* estas prononcata kiel esperanta *h*.
- **j** = [dʒ]
- *J* estas prononcata kiel esperanta *ĝ*.
- **k** = [k^h] ~ [k]
- **l** = [l]
- **m** = [m]
- **n** = [n] ~ [ŋ]
- *N* estas prononcata alveolare krom en kunmetaĵoj *nk* kaj *ng*, kie ĝi estas velara [ŋ]. Vortfine, la *g* en *ng* povas esti surda. Ekz. **pang** povas esti prononcita [paŋ] aŭ [paŋg].
- **p** = [p^h] ~ [p]

- **r** = [r] ~ [ɹ]
R estas prononcata kiel en la rusa aŭ kiel en la nordamerika angla.
- **s** = [s]
S is always voiceless like s in *sissy*.
- **sh** = [ʃ]
Sh estas prononcata kiel esperanta ŝ.
- **t** = [tʰ] ~ [t]
- **x** = [ks] ~ [s]
X estas prononcata ks, kiam ĝi estas inter vokaloj. Ekz. **maxim** estas prononcata /maksim/. In aliaj lokoj oni povas prononci ĝin kiel s, ekz. **max** /mas/, **xenon** /senon/.
- **z** = [z] ~ [dz]

Aldonaj literoj kaj sonoj

Pandunia havas ankaŭ aldonajn literojn kaj literkunmetaĵojn, kiujn oni povas uzi nur en *eksteraj vortoj*, kiuj ne apartenas al la normala vortaro de Pandunia, ekz. nomoj de lokoj, homoj kaj lokaj aĵoj

- **c** = [ts]
C estas prononcata kiel en Esperanto.
- **kh** = [x]
Kh estas prononcata kiel esperanta Ĥ.
- **gh** = [ɣ]
Voĉa Ĥ, t.e. voĉa velara frikativo.
- **ph** = [ɸ]
Voiceless bilabial fricative
- **bh** = [β] Senvoĉa bilabiala frikativo.
- **q** = [q]
Senvoĉa uvulara plozivo.
- **qh** = [χ] Senvoĉa uvulara frikativo.
- **rh** = [ʀ] ~ [ʁ]
Voĉa uvulara trilo aŭ frikativo, sama kiel rh en *rhume* en la pariza franca lingvo.
- **th** = [θ]
Senvoĉa dentala frikativo, sama kiel th en la angla vorto *thing*.
- **dh** = [ð]
Voĉa dentala frikativo, sama kiel th en la angla vorto *they*.
- **zh** = [ʒ]
Zh estas prononcata kiel esperanta Ĵ.
- **w** = [w] ~ [v] ~ [ɥ]
W estas prononcata same kiel v.

La aldonaj literoj kaj literduopoj estas uzataj nur loke. Ilia funkcio estas helpi transskribi nomoj en lokaj lingvoj en la globalan lingvon tiel, ke lokaj homoj povas rekoni ilin. Se vi ne scias kiel prononci aldonajn sonojn, tio ne estas problemo. La literoj *c*, *q* kaj *w* eblas esti prononcita same kiel *ch*, *k* kaj *v*, kaj la literduopoj eblas esti prononcita kiel la baza litero sen *h*. Ekzemple, oni povas prononci *zh* simple kiel *z* en la simpligita internacia akcento.

Ekzemple, la nomo de la ĉefurbo de Grekujo estas “Αθήνα” /aθina/ en la loka lingvo, la greka. En Pandunia tiu nomo estas skribita “Athina”. Oni povas prononci ĝin aŭ /aθina/ (kiel greke) aŭ /atina/ (en la simpligita internacia akcento).

Pliaj ekzemploj:

Khartum Ĥartumo (la ĉefurbo de Sudano)

Rhone Rodano (rivero “Rhône” en Francujo kaj Svislando)

Akcento

La akcento estas je la vokalo antaŭ la lasta konsonanto.

- **mau** /máu/, **hotel** /hotél/
- **nove** /nóve/, **muzike** /muzíke/, **arabi** /arábi/
- **dunia** /dúnia/, **arabia** /arábia/
dunia es mimen su mei planeta.
/dúnia és mímen su méi planéta./

mi vol loge komun bashe, da es pandunia.
/mí vól lóge komún báshe, dá és pandúnia./

Uskleco

Pandunion oni normale skribas per minusklaj literoj. Majuskajn literojn eblas uzi komence de frazoj kaj nomoj, ekzemple de personoj aŭ lokoj, sed tio ne esta deviga.

Minuskloj ne estas necesaj, pro tri kialoj:

1. La skribo reprezentas la parolsonojn, kaj ne estas “majuskaj sonoj” en parolado, ekzemple komence de personaj nomoj kaj ceteraj kazoj.
2. La plej multaj skrib-sistemoj kaj alfabetoj el la mondo ne havas kaj minusklojn kaj majusklojn, sed ĉiu signo havas unu solan formon.
3. Estas pli simple, uzi nur minusklojn.

Noto: Ne estas erare, uzi majusklojn. Foje oni faras tion por kutimo en aliaj lingvoj. Sed majuskloj estas ne-necesaj kaj ne-rekomendataj.

En pandunio majusklojn oni uzas en la internaciaj normaj akronimoj kaj simboloj, ekzemple: 10 Mb (des megobite), 100 Gb (hon gigobite), 2 mm (dul milometre), 1 kJ (un kilojul).

Silaboj

[-] Eblas dividi vortoj per streketo inter la elparolataj silaboj. Ekzemple: ka-fe, yu-mor, pos-te.

Interpunkcio

[.] Ĉiaj frazoj povas finiĝi per punkto.

[?] Demandoj povas finiĝi per demando-signo anstataŭ punkto.

[!] Kri-signo montras laŭton aŭ emfazon.

[...] Tripunkto montras nefinitan frazon aŭ necertecon.

[:] Dupunkto montras komencon de klarigo aŭ listo.

[,] Komo indikas etan paŭzon aŭ apartigo inter listeroj.

En neformalaj tekstoj, miensimboloj kaj emoĝioj povas uziĝi por montri humoron. Ekzemple :) montras feliĉon kaj :(montras malfeliĉon.

mi vide tu :) = Mi vidas vin.

mi no vide tu :((= Mi ne vidas vin.

Vorto-strukturo

La plej ofta vorto-strukturo estas KVKV, kie K estas konsonanto kaj V estas vokalo.

La plej malfacila vorto estas KLVKKVK, kie L estas likva konsonanto (l aŭ r). Ekzemple **kristal** estas tia vorto.

Komencaj konsonantoj povas esti nur jenaj:

1. Iu ajn sola konsonanto, escepte de /ŋ/
2. Oklusiva konsonanto kaj likva konsonanto
 - pl, bl, kl, gl
 - pr, br, tr, dr, kr, gr

La permesitaj vorto-finaj konsonantoj estas: f, h, l, m, n, ng, r, s, x, v, y

Pronomoj

Personaj pronomoj

Pronomoj povas aperi anstataŭ substantivoj.

Ununombra	Multenombra
mi	mimen
mi	ni
tu	tumen
vi, ci	vi
da	damen
li, ŝi, ĝi	ili

All pronouns can be used for all genders.

La posedaj pronomoj estas formata per aldo de partiklo **su**.

Ununombra	Multenombra
mi su	mimen su
mia	nia
tu su	tumen su
via, cia	via
da su	damen su
lia, ŝia, ĝia	ilia

Refleksiva pronomo

se – si (mem)

Rimarko: La refleksiva pronomo **se** povas uziĝi por ĉiuj personoj. Do ĝi rilatas al ĉiuj tiaj uzadoj en Esperanto, kiel: *mi(n) mem*, *vi(n) mem*, *ni(n) mem* kaj *si(n)*.

mi vide se – Mi vidas min.

da vide se – Ŝi vidas sin.

mimen vide se. – Ni vidas nin.

Oni uzas **se kon** por esprimi reciprokecon.

semen – unu la alia

mi i tu vide semen. – Mi kaj vi vidas unu la alian.

mimen vide semen. – Ni vidas unu la alian.

Montrovortoj

La montrovorto estas:

ye – ĉi tiu

vo – tiu

la – la

ye e bon. – ĉi tiu (aĵo) estas bone.

vo e dus. – Tiu (aĵo) estas malbone.

mi vol ye buku, no vo. – mi volas ĉi tiun libron, ne tiun.

Demandovortoj

ke estas la ĝenerala demandovorto en pandunio. Ĝi funkcias kiel la demanda senco de la vortoj *kiu* kaj *kio*.

ke? – Kiu?/Kio?

ke xe? – Kio? (Kiu afero?)

ke jen? – Kiu? (Kiu persono?)

ke zaman? – Kiam? (Kiu tempo?)

ke yang? – Kiel? (Kiu maniero?)

ke sabu? – Kial? (Kiu kaŭzo?)

Ankaŭ adjektivoj estas demandataj per **ke**.

ke neu? – Kiom nova?
ke koste? – Kiom multekosta?
ke poli? – Kiom multe?
ke dai? – Kiom granda?
ke shau? – Kiom eta?
tu ha ke dai di mau? – Kiom granda kato vi havas?

Substantivoj

##. Senfleksiaj

Substantivo estas vorto kiu prezentas aferon. Substantivoj estas senfleksiaj, kiel aliaj vortospecoj en pandunio. Do oni uzas la saman formon por ununombra, multnombra, difina kaj nedifina senco.

ite – ŝtono, ŝtonoj, la ŝtono, la stonoj
meza – tablo, tabloj, la tablo, la tabloj
kursi – seĝo, seĝoj
sui – akvo

Plejofte la nombro kaj la difineco estas evidenta, se ĝi estas jam priklarigita antaŭe en la teksto aŭ pro ĝenerala kono. Ekzemple, normale la vorto **sol** temas pri *la suno* kaj **luna** temas pri *la luno*; nia nura suno kaj luno.

Kunmetante du aŭ pli da vortoj, oni kreas novan vorton. La lasta vorto en tia kunmetita ĉeno estas la kerna vorto. La aliaj vortoj, kiuj antaŭas la kernan vorton, nur modifas ĝian senco.

sol foto – suna lumo
luna foto – lun lumo
luna ite – luna ŝtono

Nombro

Substantivoj havas la saman formon en la singularo kaj la plularalo. Oni povas esprimin nombron per numeraloj kiam ĝi estas utila.

kursi – seĝo aŭ seĝoj
un kursi – unu seĝo
du kursi – du seĝoj
tri kursi – tri seĝoj
men kursi – multe da seĝoj; seĝoj

Genro

Pandunia ne havas gramatikan genron (t.e. maskla, femala kaj neŭtra kategorioj).

Kelkaj vortoj enhavas *naturan genron*. Ekzemple **fem** (virino) estas femala kaj **man** (viro) estas maskla.

Nombrovortoj

Kvantaj nombrovortoj

Unuoj	Dek kaj pli	20 kaj pli	30 kaj pli
0 siro	10 (un) des	20 du des	30 tri des
1 un	11 des un	21 du des un	31 tri des un
2 du	12 des du	22 du des du	32 tri des du
3 tri	13 des tri	23 du des tri	33 tri des tri
4 nelu	14 des nelu	24 du des nelu	34 tri des nelu
5 lima	15 des lima	25 du des lima	35 tri des lima
6 luka	16 des luka	26 du des luka	36 tri des luka
7 ceti	17 des ceti	27 du des ceti	37 tri des ceti
8 bati	18 des bati	28 du des bati	38 tri des bati
9 tisa	19 des tisa	29 du des tisa	39 tri des tisa

Unuoj	Dekoj	Centoj	Miloj
1 un	10 (un) des	100 (un) sento	1000 (un) kilo
2 du	20 du des	200 du sento	2000 du kilo
3 tri	30 tri des	300 tri sento	3000 tri kilo
4 nelu	40 nelu des	400 nelu sento	4000 nelu kilo
5 lima	50 lima des	500 lima sento	5000 lima kilo
6 luka	60 luka des	600 luka sento	6000 luka kilo
7 ceti	70 ceti des	700 ceti sento	7000 ceti kilo
8 bati	80 bati des	800 bati sento	8000 bati kilo
9 tisa	90 tisa des	900 tisa sento	9000 tisa kilo

Pli grandaj nombroj sekvas la saman logikon kiel supre.

10'000 = un des kilo
 100'000 = un sento kilo
 1'000'000 = un mega
 10'000'000 = un des mega
 100'000'000 = un sento mega
 1'000'000'000 = un giga

Por la nombroj pli grandaj ol 999, eblas uzi la oblajn prefiksojn el la Sistemo Internacia de Unuoj. Do ekzemple *kilo* indikas miloblecon.

Prefikso	Simbolo	10-baze	Decimale
kilo	k	10 ³	1'000
mega	M	10 ⁶	1'000'000
giga	G	10 ⁹	1'000'000'000
tera	T	10 ¹²	1'000'000'000'000
peta	P	10 ¹⁵	1'000'000'000'000'000
exa	E	10 ¹⁸	1'000'000'000'000'000'000
zeta	Z	10 ²¹	1'000'000'000'000'000'000'000
yota	Y	10 ²⁴	1'000'000'000'000'000'000'000'000

Nombrovortoj antaŭ substantivoj

Kelkfoje la kvanto de la priparolata objekto estas jam konata laŭsituaĵe. Ekzemple la vorto **la sol** (la suno) normale temas pri unu suno, ĉar ekzistas nur unu.

Oni esprimas kvanton aŭ nombron per kvantovortoj. Nombro staras antaŭ la vorto aŭ vortoĉeno kies kvanton ĝi indikas.

un sing – unu stelo
du sing – du steloj
tri sing – tri steloj
kam sing – kelkaj steloj
men sing – multe da steloj

un dai kursi – unu granda seĝo
du dai kursi – du grandaj seĝoj
tri hau kursi – tri bonaj seĝoj

Ordaj nombrovortoj

Aldoni partiklon **me** al nombro por krei ordan nombron.

- **un me** – unua
- **du me** – dua
- **tri me** – tria
- **nelu me** – kvara
- **lima me** – kvina
- **luka me** – sisa
- **ceti me** – sepa

- **bati me** – oka
- **tisa me** – naŭa
- **des me** – deka

Ili estas metita antaŭ la modifiita substantivo.

un me fen – la unua parto

du me fen – la dua parto

tri me fen – la tria parto

Ankaŭ aliaj ordaj vortoj estas kreita per la sama partiklo.

pre ‘antaŭ’ → **preme** ‘antaŭa’

pos ‘post’ → **posme** ‘sekva’

xuru ‘komenco’ → **xurume** ‘komenca, unua’

fin ‘fino’ → **finme** ‘fina, lasta’

Ordaj nombroj estas metita antaŭ kvantaj nombroj.

un me tri kupa kafe – la unuaj tri tasoj de kafo

Ordaj nombroj post substantivo

Se la kvantovorto estas ordonombro, ĝi aperas post la vorto kiun ĝi modifas.

fen un – la unua parto

fen du – la dua parto

fen tri – la tria parto

Dato kaj horo

Tagoj de semajno

Tagoj de semajno estas nomigitaj laŭ astroj de la sola sistemo, kaj ili finiĝas je la vorto **den** (‘tago, 24 horoj’).

1. **lunaden** – lundo
2. **marisden** – mardo
3. **merkurden** – merkredo
4. **muxinden** – jaŭdo
5. **zukurden** – vendredo
6. **shaniden** – sabato
7. **solden** – dimanĉo

Monatoj

Nomoj de monatoj enhavas nombron de monato kaj **mes** ‘monato’.

1. **mes un** – januaro
2. **mes du** – februaro
3. **mes tri** – marĉo
4. **mes nelu** – aprilo
5. **mes lima** – majo
6. **mes luka** – junio
7. **mes ceti** – julio
8. **mes bati** – aŭgusto
9. **mes tisa** – septembro
10. **mes des** – oktobro
11. **mes des un** – novembro
12. **mes des du** – decembro

Modifovortoj

Modifovorto estas vorto, kiu priskribas econ de alia vorto. Panduniaj modifovortoj rolas kiel adjektivoj kaj adverboj en Esperanto. En pandunio, modifovortoj antaŭas la substantivon aŭ verbon kiun ili modifas.

Modifante substantivon

un neu gar – nova aŭto **un suga gar** – rapida aŭto
men dai meza – grandaj tabloj
men gau meza – altaj tabloj
un hau jen – bona homo

Kiam modifovorto sekvas substantivon, ĝi rolas kvazaŭ kiel verbo, kiu indikas staton. Tio estas, kiel adjektivaj verboj en Esperanto.

gar e neu. – La aŭto novas. (Aŭ: La aŭto estas nova.)
bagre e suga. – Tigroj rapidas. (Aŭ: Tigroj estas rapidaj.)

Kompreneble, eblas ke modifovortoj aperu je ambaŭ flankoj de substantivo.

un neu gar e suga. – Nova aŭto estas rapida.

Modifante verbon

tu suga loga. – Vi *rapide* parolas.
damen hau kitaba. – Ili *bone* skribas.
tu mei di kitabu. – Vi *bele* skribas.
damen suga di marce. – Ili *rapide* promenas.

Modifante alian modifovorton

Modifovorto povas modifi ankaŭ alian modifovorton. Aldoni partiklon **di** inter la modifanta kaj la modifata.

un dai di_ hau buku – *grande* bona libro
poli bala di ame ja jen – *forte* amantaj homoj

Komparoj

Modifovortoj povas esti komparataj.

- **max** (pli) signifas komparo de plieco
- **maxim** (la plej) signifas komparo de plejeco
- **min** (malpli) signifas komparo de malplieco
- **minim** (malplej) signifas komparo de malplejeco
- **par** (same, egale) signifas komparo de sameco

Partiklo **ko** rilatas komparvortoj al la fonto de komparo.

aple e max hau ka oranje. – Pomoj estas pli bonaj ol oranĝoj.
oranje e min hau ka aple. – Oranĝoj estas malpli bonaj ol pomoj. **tu loga par hau ka mi.** – Vi parolas same bone kiel mi.

Verboj

Persono kaj nombro

Subjekto indikas personon kaj nombron de verbo. Ekzemple, la verbo **e** ('esti') havas la saman formon en ĉiu person.

mi e doste. – mi estas amiko.
tu e doste. – Ci estas amiko.
ya e doste. – Ri (li aŭ ŝi) estas amiko.
mimen e doste. – Ni estas amikoj.
tumen e doste. – Vi estas amikoj.
damen e doste. – Ili estas amikoj.

Ankaŭ substantivo povas roli kiel subjekto.

mau e hevan. – Kato estas besto.

Ofte estas markilo inter subjekto kaj verbo por indiki la limo inter subjekto kaj verbo. Tio estas helpema kiam kaj la subjekto kaj la verbo estas leksikaj vortoj kaj kune ili povus ŝajni kiel unu kunmetita vorto. Tia markilo estas tipe partiklo aŭ helpanta verbo. Unu de la multaj uzeblaj markiloj estas **ya** ('jes, ja'), ĉar ĝi ne ŝanĝas signifon de la frazo sed nur klarifigas sian konstruon.

tuzi yam. – Kunikla manĝo. – Kuniklo manĝas.
tuzi ya yam. – Kuniklo (ja) manĝas.
karote e tuzi yam. – Karoto estas kunikla manĝo.
tuzi ya yam karote. – Kunikloj (ja) manĝas karotojn. # Vortfarado